§

# Jura Semajno

**Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Septembro: 3 2025**

## NOVA JURA SITUACIO EN ĈILIO: "FORESTO PRO DEVIGA MALAPERO"

Ĉilia kongreso aprobis la deklaron kiel juran situacion de la "foresto pro deviga malapero", kies celo estas agnoski, el la jura vid-punkto, malaperintojn dum la ĉilia diktaduro de la generalo Augusto Pinochet inter 1973 kaj 1990. La projekto nun estos debatata en la ĉambro de deputitoj.




Ĉi tiu nova leĝo antaŭvidas la starigon de publika registro kun la nomoj de ĉiuj arestitoj, kaj poste perforte malaperintoj dum tiuj jaroj.

Laŭ unuaj kalkuloj ili estis 3200, el kiuj 1092 nuntempe troviĝas ĉe ne-konata loko. Duono el ili estis laboristoj kaj 15% el tiuj viktimoj estis malpliaĝaj ol 21 jaroj. La ministro pri justico kaj homaj rajtoj Jamie Gallardo asertis, ke ĉi tiu leĝo likvidos debon de la ŝtato rilate tiujn viktimojn. Ĉi tiu nova registro ebligos al familianoj disponi pri atestilo agnoskanta la juran situacion de tiuj homoj, kiuj estis perforte malaperigitaj dum la ĉilia diktaduro.

Kompreneble, la ministro asertis, la ŝtato ankoraŭ devas daŭrigi la serĉadon de tiuj viktimoj kaj cele al tio, oni uzos la plej modernajn teknologiojn. Nuntempe, uzo de droneoj (senpilotaj aviadiloj) ebligos vidi tiujn lokojn kies tera surfaco estis iam fosita. Tiel, laŭ la ministro, se la ĉilia ŝtato perforte malaperigis ilin, tiu sama ŝtato devas serĉi ilin kaj klopodi, kiel eble plej efike, rekonstrui la vivan vojon de tiuj viktimoj.

# *Vorto de la Semajno*

**DEFENDI**

Helpi akuziton antaŭ tribunalo.

*Sinonimo: Helpi.*

*Ekzemplo: Estas rolo de advokato defendi sian klienton, eĉ kulpan.*



## *Sciigo de nia frata asocio*
## *Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj*

La estraro de UIAE (prezidanto: Miguel Faria de Bastos), ekde ties fondiĝo, klopodas anigi al si advokatojn esperantlingvajn, surbaze de plano (eble tro ambicia) ekhavi membraron en pli ol duono de la landoj reprezentitaj ĉe la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, minimume po unu el ĉiu lando. Tiu-perspektive ĝi havas membrojn en ĉiuj kontinentoj (rekordo: ses en Angolo), sed la celata nombro po-landa estas tre malproksima de tiu plano.

La ĉefa strategia ideo estis kaj estas videbligi UIAE-N antaŭ la eksteraj rondoj de advokatoj -ordenoj, ordenaj federacioj, internaciaj kaj plurnaciaj asocioj ktp- pere de ret-letera korespondado, reciproka ŝanĝado de impresoj kaj ideoj, surscena simulado de juĝaj audiencoj

en Esperanto, kunorganizado de prelegoj kaj kolokvoj kun samtempa tradukado de Esperanto en naciajn lingvojn de la tieaj eventoj. Tiumaniere, ke la ne-esperantaj advokatoj povu, surbaze de inter-rilatiĝo, leksikografia paralela instruado, interlingvistika komparado de juraj terminoj, spektado de esperantlingvaj juraj sesioj ktp, konscii ke Esperanto povas funkcii utile kaj efike en la juraj medioj kaj apud tribunaloj, inkluzive de arbitraciaj tribunaloj.

La unua elektita vicprezidanto akceptis redakti internan revuon, eble dulingvan (ekz. esperanta kaj angla, por plifaciligo de la propagando), samkiel tiu de Frankfurto (esperanta kaj germana). Tamen, post, pro personaj kialoj, li demisiis kaj ne plu iu ajn aperis preta anstataŭi lin.

Malgraŭ tio, ke la aniĝ-kotizo ne estas deviga, ke la propagando de la asocio estis okulfrapa, inkluzive dum la Movada Foiro kaj en similaj eventoj, kaj ke allogaj prelegoj estis faritaj frame de UIAE, nombro de asocianoj preskaŭ ne kreskis kaj la socio stagnas. Estas nuntempe prem-kampanjo cele al tiu kreskado.

Stranga fenomeno estas tiu, ke E-advokatoj el malsamaj landoj aperas ne malofte opiniante, ke la agad-plano de UIAE ŝajnas interesa kaj pri-ekzameninda. Kelkaj konsideras la eblecon aniĝi de antaŭ pli ol unu jaro, tamen ili ankoraŭ ne decidis ĉu eniri aŭ ne.

La estraro de UIAE invitas kaj atendas vin. Uzu tiucele la adreson: mfb@debastosadvogados.com.

Vi estu bonvena.

Kore via. *Miguel Faria de Bastos*

*Advokato*

*OAP n.ro 4916L / OAA N-ro 174*